

# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



En la numero:

ESPERANTO  
KAJ PACBATALO

•

UEA FARIĜAS 75-JARA

•

RENKONTIĜO KUN

LA PASINTECO

•

DEBRECEN  
BONVENIGAS VINI!

•

GORKIJ KAJ ESPERANTO

•

GOCE DELŬEV

•

LA ALIAJ PRI NI

•

NIA RAKONTO

•

LINGVAJ PROBLEMOJ


•

ENLANDA MOVADO

•

DISTROJ





# ESPERANTO KAJ PACBATALO

(30-jariĝo de la Esperantista Pacdefenda Movado)

Canko MURGIN

La homaro havas miljaran sperton en militado. La organizita pacbatalo tamen estas tute nova fenomeno.

En 1932 en Amsterdamo okazis impona kontraŭmilita kongreso, kie speciale estis kritikita la japana agreso kontraŭ Ĉinio (1931). Gravaj estis ankaŭ la Monda Packongreso de la Junularo en Parizo (1935) kaj la Monda Packongreso de Verkistoj en Madrido (1937). Spite al ĉiuj avertoj, la monda imperiismo per la Munkena Konkordo (1938) puŝis la homaron al la Dua Mondmilito. Post sesjara sangverŝa milito komenciĝis la periodo de dudekjara „malvarma milito“. En tiuj nenormalaj postmilitaj kondiĉoj la landoj de reala socialismo kaj la progresemaĵoj homoj el la cetera mondo insiste pledis por paco. En 1949 estis fondita nova pacdefenda movado, gvidata de la Monda Pac-Konsilio. La esperantistoj el la tuta cetera mondo trovis en la batalo por defendo de la paco sian plej gravan celon.

En decembro 1952 okazis la Monda Packongreso en Vieno. Ĝin partoprenis, kiel oficialaj delegitoj, esperantistoj el Anglio, Argentino, Nov-Zelando k. a. La sperto, kiun la esperantistaj pacdefendantoj akiris en kunlaboro kun la kongresoj, organizitaj de la Monda Pac-Konsilio kaj precipe tiu, okazinta en Vieno (1952), konvinkis ilin pri la neceso krei internacian pacdefendan esperantistan movadon.

Komence de 1953 la Aŭstria Pacrondo Esperantista lanĉis la iniciaton pri fonda de tia movado. La internacia renkontiĝo de esperantistaj pacdefendantoj en St.-Pölten, Aŭstrio, la 6-an de septembro, decidis starigi Mondpakan Esperantistan Movadon (MEM), laŭ la principoj kaj celo formulitaj en speciala „Manifesto“, kiu en 1963 estis anstataŭigita per Statuto. Presorgano de MEM estiĝis la novefondita monate aperanta gazeto „Paco“. El la landoj-fondintoj la renkontiĝon partoprenis: Aŭstrio, Belgio, Francio, Britio, Hispanio kaj Svedio. ĈSSR partoprenis en la preparlaboroj kaj ĝiaj ses delegitoj aliĝis skribe. Jam en 1954 aliĝis al MEM kaj al la eldonsistemo de gazeto „Paco“ ankaŭ Islando, Japanio kaj Danlando. La dekunua aliĝinta lando estis Bulgario.

En novembro 1955 en Bulgario estis eldonita n-ro 24 de „Paco“, kaj en marto 1956

oni eldonis ankaŭ n-ro 28 de „Paco“ kaj fondis pacsekcion ĉe BEA sub la nomo „Bulgara MEM-Komitato“. La bulgaraj „Paco“-eldonoj de 1955 kaj 1956 estis stencilitaj, kaj en la periodo 1957—1973 en Bulgario oni ĉiujare eldonis presitan numeron de „Paco“. Ekde 1974 la oficiala serio de „Paco“ aperas en Sofio dumonate. Iuj landaj MEM-sekcioj plu eldonas propran „Paco“-numeron ĉiujare: GDR, ĈSSR, Hungario, Japanio, Vjetnamio k. a. La landaj esperantistaj organizaĵoj en la socialismaj landoj aliĝis al MEM. Vjetnamio fondis pacdefendan E-asociacion — VPEA (1956), kiu estas sekcio de MEM. Tiu sperto poste estis tre utila al Japanio, Hispanio, Britio.

Inter la bulgaraj esperantistoj elstaris per sia pacaktivado (kronologie): E. Cifudov, M. Conkovski, Iv. K. Vasilev, P. Arnaudov, Tinka Lakova, Trajana Petkova, Asen Grigorov, Ivan Keremidĉiev, N. Nikolov, V. Oljanov, G. Dolapĉiev, N. Aleksiev, Hristo Gorov, N. Pārvanov, Hristo Manolov, Iv. Canev, Zora Mladenova — Hans, Radoslav Triĉkov, Donĉo Hitrov, L. Lalev, Iv. Bataklijev, ing. A. Todorov, B. Popov, Vasja Petrova — Cvetkova, Dimităr Haĝiev, Zahari Ivanov k. a.

La Konferenco de la Bulgara MEM-Komitato, okazinta en Sofio la 26-an kaj 27-an de marto 1983, profunde pridiskutis sian ĝisnunan agadon kaj, konforme al la kreskanta militarismo de la imperiistaj rondoj en Usono, Japanio kaj en la ŝtatoj de la NATO-bloko planis komplekson de novaj gravaj taskoj, direktitaj al senmaskigo de la agresema imperiismo, al ĉesigo de la vetarmado. La batalo por konservo de la paco fare de la reala socialismo estas nek izolita, nek sporada.

La vastaj popolamasoj en la kapitalismaj landoj iras pli kuraĝe kaj pli firme ol antaŭe al la sama celo kontraŭ la milito. Kvankam suferantaj pro konstanta inflacio, kvankam minacataj de senlaboreco kaj timigataj per la elpensita „soveta minaco“, ili elpaŝas heroe en mitingoj, pacmarŝoj, en protestaj agoj per blokado de militbazoj, per kontraŭstaro al la reala minaco fare de la usonaj militemuloj kaj ties aliancanoj en la ceteraj imperiismaj ŝtatoj.

(Sekvas sur paĝo 3)



# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 52

APRILIO

4 • 1983

## UEA FARIGAS 75-JARA

GREGOIRE MAERTENS,  
prezidanto de UEA

*En aprilo ĉi-jare kompletigos tri kvaronoj de jarcento post la fando de Universala Esperanto-Asocio en 1908. Kvankam ni ankoraŭ plurfoje revenos al tiu jubileo tra la jaro, mi volas nun elstarigi du elementojn el la 75-jara historio de UEA, kiuj estas eĉ pli aĝaj ol la Asocio mem.*

*„Kiom brila ideo estas tiu delegita sistemo!“, skribis Baldur Ragnarsson, vicprezidanto de UEA, en sia antaŭparolo por la Jarlibro 1982. Efektive, tiu brila ideo trovigis en la koncepto de nia Asocio jam antaŭ 75 jaroj, kaj ĝi ankoraŭ nun, en 1983, funkcias kiel unu el la bazaj strukturoj de UEA.*

*Kiam en 1908 Hektor Hodler, la fondinto de UEA, volis realigi sian revon pri starigo de granda unueca internacia organizaĵo, li bone konsciis, ke tiu nova tutmonda asocio devas transpreni kaj kunigi la du jam ekzistantajn elementojn: la revuon „Esperanto“ de Paul Berthelot kaj la reton de pli ol ducent „konsuloj“ (delegitoj), kiuj jam funkciis konforme al la ideoj de Alphonse Carles (fondinto de la Esperanto-grupo en Béziers, Francio), kaj „oficejoj“ iniciatitaj de Théophile Rousseau (el Bourg, Francio). Per la omaĝo al tiuj du francoj, kiujn ni nun rememoras okaze de la 75-jara jubileo de UEA, ni volas emfazi la kontinuecon de nia Asocio, kiu fidele flegas ĉiujn gravajn uniciaĵojn tra la tuta periodo de sia 75-jara disvolvigo.*

*La Jarlibro de UEA ankaŭ jubileas ĉi-jare (la unua aperis en 1908). Ĝia lasta eldono, tiu por 1982, enlistigas nun 3 597 delegitecojn, por kiuj la difino ankoraŭ restas tiu el 1908:*

*sensalajra ofico, kiun la delegito akceptas por utili al Esperanto kaj al la Esperanto-parolantoj.*

*En nia Movado neniu cetere dubas, ke tiu dekomenca idealismo kaj ĉiama solidareco kaj preteco de la Esperanto-parolantoj por subteni la disvastigon de Esperanto kaj de nia Asocio restis sama tra la pasintaj 75 jaroj. Tamen nun komence de 1983, ni sentas, ke eksteraj ne-movadaj faktoroj minacas negative influi la vastigon de nia Delegita Reto, same kiel la ceteran vivon de la Asocio. Nun fine ankaŭ la Movado komencas sperti la sekvojn de tutmonda ekonomia krizo, kiun la homaro travivas jam de kelkaj jaroj. Kompreneble ke ankaŭ nian Asocion trafas la sekvoj de senlaboreco kaj inflacio en tiu aŭ alia lando, la transpagaj problemoj de tuta aro da landoj, politika malstabileco en diversaj mondopartoj ktp. Se ĉiuj ĉi problemoj reflektiĝas en la vivo de UEA kun kelkjara malfruo, tio estas ankoraŭ unu pruvo pri la potenco de tiu movada solidareco, kiun ni ĝuas tra la tuta historio de UEA. Ni jam spertis kaj certe denove spertos, ke kiam el unu lando ne plu eblas transpagi kotizojn, tiam la esperantistaro de aliaj landoj pretas helpi kaj faras tion pere de niaj diversaj fondaĵoj.*

*Ni do ne permesu, ke en 1983 diversaj ekstermovadaj obstakloj bloku tiun mirindan kaj tradician solidarecon de ĉiuj Esperanto-parolantoj en la unueca UEA. Tiamaniere ni ne nur venkos la sekvojn de la ekonomia krizo, sed ni ankaŭ plej konvene omaĝos la ideojn, kiuj inspiris kaj instigis Carles, Rousseau kaj Hodler al la fando de la jubileanta UEA.*

## HEKTOR HODLER — FONDINTO DE UEA



La historio de la amasa internacia esperantista organizado estas nedisigeble ligita kun la nomo de Hektor Hodler.

H. Hodler estis filo de fama svisa pentristo Ferdinand Hodler. Informoj, kiujn ni posedas pri lia infanaĝa tempo, montras, ke ĝi estis sufiĉe peza, komence pro cirkonstancoj ekonomiaj kaj poste pro certa familia disharmonio inter la gepatroj.

En la jaro 1903, estante gimnaziano, Hodler konatiĝis kun Esperanto. Depost tiu tempo li plene donis sin al la afero de la lingvo internacia. En la jaro 1907 li, lasinte siajn studojn gimnaziajn, prenis sur sin eldonadon de la gazeto „*Esperanto*“. Lia klereco estis nature ne sistema kaj ne sufiĉa. Tre ŝargita per diversaj esperantaj laboroj, nur post la jaro 1914 li ricevis eblecon pligrandigi siajn sciojn, speciale en la kampo de sciencoj sociaj (XIV, p. 47).<sup>1/</sup>

Nin speciale devas interesi konceptoj de Hodler, rilatantaj la internacilingvan movadon Hodler ne apartenis al tiuj esperantistoj,

kiuj taksas la mondlingvan problemon sendepende de aliaj problemoj sociaj. En decembro 1913 li skribis: „por taŭge juĝi nian aferon, ni ne devas ĝin izoli for de la ekstera mondo“ (XIV, p. 61). Li bone taksis la fakton, ke Esperanto kiel lingvo progresas per si mem eĉ sen iuj specialaj organizaj kaj gvidaj institucioj. Sed ankoraŭ pli alte li taksis la fakton, ke „multloke oni ne plu ridas je nia celado, sed serioze konsideras ĝin“ (XIV, p. 63). Per sia tuta laboro li pleje volis akceli, ke laŭeble kresku kvanto da homoj „serioze konsiderantaj“ la movadon. Li kreis idealon de modesta esperanta laboranto „s-ro Laborulo“, kiu malmulte sin okupas pri esperantista politiko, sed plenumas certajn farojn, gvidas kursojn, faras servojn al eksterlandanoj kaj tiamaniere formike sukcesigas la movadon (XIV, p. 68).

Li volis, ke la lingvo ne haltu en sia evoluo, ke ĝi „adaptiĝu je la nuntempaj bezonoj de la penso“ (XIV, p. 80). Tial li kritikis la malmulte valorajn literaturajn tradukojn el lingvoj naciaj. Tial li instigis traduki verkojn gravajn kaj aktualajn — anstataŭ la klasiĉajn ne tiom valorajn por la nuntempo.

Tia estis la fondinto de Universala Esperanto-Asocio (UEA), la sola, sur certaj sociaj bezonoj sin apoginta internacia organizo de esperantistoj.

Hektor Hodler estis pli reala ol Zamenhof, sed ankaŭ lia realemo havis kiel sian devenon profundan idealismon. Prave skribis E. Privat pri li: „Al tio, kion iniciatis la genio de Zamenhof sur la kampo lingva, li aldonis la — necesan bazon sur la kampo socia“ (XIV, p. 11)).

Per „XIV“ estas notita la titolo „Hektor Hodler, lia vivo kaj verko, UEA, Ĝenevo, 1928“ en la „Listo de fontoj historiaj“ fine de la libro de E. Drezen. (E. Drezen, „*Analiza historio de Esperanto-Movado*“)

Jam en la Bulonja Kongreso A. Carles (Béziers) prezentis proponon pri elekto de esperantistaj reprezentantoj, konsuloj — en grandaj urboj. Tiu propono estis tiam resendita al la Organiza Komitato, kiu raportis ĝin al la Geneva Kongreso. Multaj timis internacian organizon de la Esperantistaro, al aliaj ne plaĉis la nomo „konsuloj“, fine la Kongreso decidis simple rekomendi al naciaj societoj fondon de esperantaj informoj. La afero progresis rapide: jam en la fino de jaro 1906 ekzistis 120 esperantaj Konsulejoj kaj Oficejoj, en 1907 — 232, en 1908 — 303. Tiamaniere estis preparita bazo reala, sur kiu povis jam facile apogi sin organizacio, unuiganta ĉiujn ĉi ejojn. La 28-an de aprilo 1908 estis fondita Universala Esperanto-Asocio por „faciligi ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter homoj, sen distingo de nacio, raso aŭ lingvo, krei praktikan fortan ligilon de solidareco inter siaj membroj“. La Asocio estas absolute neŭtrala religie, politike kaj nacie.

La unua komitato estis elektita 15-an de decembro 1908: H. Bolingbroke Mudie, prezidanto, H. Hodler — vicprezidanto, A. Carles, T. Rousseau, P. Laise, J. Schmid, M. Kandt, F. Rockmann — membroj.

(Daŭrigo de paĝo 11)

La bulgaraj esperantistoj-pachatalantoj ankaŭ staras sur sia posteno en la avangardo de la mondaj pacfortoj.

Grava armilo en la manoj de la esperantistaj pacdefendantoj estas la pacproponoj de USSR en la Dua Speciala Sesio pri Malarmado de la Generala Asembleo de la Unuigintaj Nacioj, kiuj ĵus aperis libroforme en Esperanto kaj estas eldonitaj en Moskvo, en la fino de 1982, fare de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (Sovetia MEM-sekcio). Pluaj proponoj fare de USSR estis faritaj en la

parolado de Jurij Andropov (ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Sovetunio) en la solenaĵo okaze de la 60-jariĝo de la Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj fine de decembro 1982. Krom tio, la landoj de la reala socialismo, unuigitaj en la Varsovia Kontrakto, faris kolektivajn proponojn pri politika kaj milita serenigo de la internaciaj rilatoj.

Kuraĝe kontraŭ la preparatan imperiisman mondmiliton!

Por daŭra paco sub serena ĉielol

Canko MURGIN

## "ANKAŬ NI POVAS BATALI POR LA PACO..."



Ivan Marinov Stojanov el urbo Loveĉ estas lernanto en la sepa klaso de la Matematika Gimnazio. Li estas tre sciama kaj diligenta knabo, ŝatas sin okupi pri tekniko, lerni fremdajn lingvojn, deklami, ludi futbalon. Li revas estiĝi inĝeniero kaj atingi sukcesojn en la vivo. Kaj li kredas, ke Esperanto helpas al li tiurilate. Jen kion li mem rakontas pri sia konatiĝo kun Esperanto:

„Esperanto tre plaĉas al mi kaj mi lernas ĝin plezure. Unuafoje mi aŭdis pri ĝi de miaj gelernantoj. Mi baldaŭ konstatis, ke ĝi estas interesa kaj belsona, kaj mi decidis lerni ĝin sen ies ajn instigo. Mi mem serĉis la instruistojn de Esperanto en nia loĝkvartalo Kina Uzunova. Ŝi serioze kaj pacience instruis al mi la lingvon kaj per ŝia helpo la 27-an de novembro pasintjare mi povis saluti la partoprenintojn en la Dua Nacia Konferenco de Esperantistoj-Medicinistoj en Loveĉ. Mi vidis tie kolektigitajn multajn seriozajn homojn — aŭtoritatajn profesorojn, kuracistojn kaj aliajn medicinistojn el la tuta lando. Plej fortan impreson al mi faris la fakto, ke ĉiujn unuigis unu nobla ideo — por tutmonda

amikeco, homamo sen sociaj kaj naciaj baroj, batalo por la homa sano, bonstato kaj prospero, reciproka ekkono kaj interŝanĝo de spertoj en la kondiĉoj de tutmonda paco. . .

Tiu ĉi konferenco vere estis granda okazo en mia vivo — ĝi faris al mi tre fortan impreson kaj mi estis fiera, ke tiu ĉi grava aranĝo okazis en nia urbo. Eĉ la prezidanto de la Medicinista Sekcio ĉe BEA prof. d-ro K. Popov el Sofio substrekis, ke la medicinistoj el Loveĉ povas organizi ankaŭ internacian konferencojn de medicinistoj-esperantistoj en nia bela kaj gastama urbo. Dank' al tiu ĉi forumo mi praktike konvinkigis, ke per unu komuna internacia lingvo oni povas atingi multe pli bonajn rezultojn ol per lernado de kelkaj fremdaj lingvoj. Tio donis al mi impulson ekdeziri partopreni la Universalan Kongreson en Budapeŝto por trovi amikojn el diversaj landoj de la mondo. Esperanto estas lingvo de la paco kaj nun, kiam oni jam instruas ĝin en la bulgaraj lernejoj, ni gelernantoj, kvankam ankoraŭ tre junaj, ankaŭ povas batali laŭ niaj ebloj por la paco.“

D-rino Tjuran OMER

Karaj legantoj,

La esperantista pacdefenda movado estas oficiale fondita en la komenco de septembro 1953.

La Bulgara MEM-Komitato, Bulgara Esperantista Asocio kaj la redakcio de la pacdefenda gazeto „Paco“ (kies sidejo estas en Sofio) aranĝos ĉi-aŭtune solenaĵon, dediĉitan al la 30-jariĝo de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM).

Bonvolu prepari vin por dece festi tiun ĉi gravan datrevenon ankaŭ en via loka societo!

LA REDAKCIO

# RENKONTIĜO KUN LA PASINTECO

Tio estis renkontiĝo kun la pasinteco, kun juneco prilumigita de la Internacia Lingvo Esperanto. Ĝi okazis dum solena celebrado de la 25-jariĝo de la Medicinista Sekcio ĉe BEA. Ĉeestis profesoroj, superaj sciencaj kunlaborantoj, kandidatoj de medicinaj sciencoj, multaj kuracistoj.

**Prof. Kiril Popov**, prezidanto de la Medicinista Sekcio ĉe BEA malfermas la kunvenon kaj mallonge skizas la ĝisnunan historion de la Sekcio. Li invitas la ĉeestantajn medicinistojn rakonti rememorojn el sia E-vivo. La homoj vigligas. Kiu komencos? Kiu estos la unua?

**Prof. Ivan Vasilev** revenas al la jaro 1927, kiam li kiel lernanto en la gimnazio en Orhanie (nun Botevgrad), aliĝis al E-kurso: „Ni lernis laŭ lernolibro de Atanas D. Atanasov (ADA), entuziasme englutis ĉiun linion. Ĉiujn versaĵojn en Esperanto ni parkerigis, tradukis popolkantojn, kantis. . . Esperanto gajnis niajn korojn.

Kelkfoje mi iris en la vilaĝon de Trifon Ĥristovski, de kiu mi prenis korespondadresojn kaj E-bildkartojn, senditajn de Ĉina Komunista Partio kun surskribo: „Helpo al Ĉinio estas helpo al la mondpaco!“ Oni alvokis per ili al batalo kontraŭ la japana militismo. Mi ekkorespondis kun esperantistoj el multaj landoj.

Post 1944 pro okupateco mi retiriĝis de la E-movado, sed mi ne perdidis ĝin. Kiu estis esperantisto, tiu ne povas forgesi la lingvon kaj ne povas ne porti ĝin en sia koro.“

**Prof. Ilia Ŝtärkelov** ne kaŝas sian amon al Esperanto. Lin la rememoroj revenigas al 1925:

„Mi estis lernanto en kvina klaso de la gimnazio en Panagjuriŝte, kiam Stojan Guĝev entuziasmigis min pri Esperanto. Li donis al mi librojn. Mi memstare lernis laŭ la E-lernolibro de ADA. Mi havis inklinon al lingvoj, sed Esperanton mi ekamis pro la granda logikeco kaj facileco. En 1926 mi jam parolis flue la lingvon. Tiutempe mi interpretis al anglaj geedzoj-esperantistoj, kiuj dufoje prelegis pri la rolo kaj signifo de Esperanto antaŭ gimnazianoj. Rezulte multaj el ili sub mia gvido eklernis la Internacian Lingvon.

En 1962 dum monda kongreso de onkologoj en Moskvo mi konatiĝis kun la elstara japana ginekologo-esperantisto prof. Hideo Jagi. Poste ni interŝanĝis multajn leterojn. En 1964 li venis en Bulgarion. Ni vizitis kune la vicministron de Ministerio de Popola Sanprotektado kaj parolis jen esperante, jen en germana lingvo.

Ankaŭ nun en mia kabineto estas la lerno-libro de Asen Grigorov kaj vortaro. Malgraŭ mia okupateco mi fojfoje legas ion en Esperanto. Mi por ĉiam restis fidela amiko de Esperanto.“

**Prof. Ĥristo Golemanov** en 1937 kiel gimnaziano en Elena komencis lerni aŭtodidakte la Internacian Lingvon. Jam la saman jaron li partoprenas la Bulgaran E-Kongreson en Pleven. Tie li konatiĝas kun la esperantistoj Georgi Iliev kaj Lenin Miŝev, kiuj poste heroe pereas en la rezista batalo kontraŭ la faŝismo.

„En 1939 mi venis Sofion. Mi lernis en III Knaba Gimnazio. Mi abonis gazeton „Bulgara Esperantisto“, aĉetis la rakontojn de Elin Pelin kaj Ivan Vazov en Esperanto, la poemkolektojn de Ĥristo Botev. Esperantajn versojn mi mem verkis kaj ankaŭ gvidis 4—5 kursojn por komencantoj en legejo „Goce Delĉev“. Mi havis viglan korespondadon.

Ĝis 1944 mi havis aktivan E-agadon. Poste la vivo min kaptis kaj ŝarĝis per multaj engaĝoj. Tamen Esperanto restis en mia animo. Mi ne forgesis ĝin. Mi legas E-librojn kaj revuojn. Mi ne povus perdi Esperanton, ĉar ĝi havigis al mi multajn amikojn en mia juneco. . .

**Prof. Kiril Popov** havas ankaŭ kion rakonti: „Mi estis lernanto en kvina klaso de la gimnazio en Veliko Târnovo, kiam mi renkontis Botjo Penev. Li interesigis min pri Esperanto. Bedaŭrinde, pro komunista agado, B. Penev estis kondamnita je morto.

Mi vigle korespondis kun nederlandano kaj svedo. Poste mi forlasis urbon Veliko Târnovo kaj retiriĝis de Esperanto. Tamen en 1962, kiel kuracisto el la bulgara kuracista brigado en Vjetnamio, mi konatiĝis kun vjetnamaj esperantistoj kaj ni fariĝis amikoj. Antaŭ kvar jaroj mi denove eklaboris en la E-movado. Oni elektis min prezidanto de la Medicinista Sekcio ĉe BEA.“

**Supera scienca kunlaboranto d-ro Nikolaj Donev** ne tre emas paroli. Lia konfeso estas riproĉo al si mem:

„Esperanton mi komencis lerni antaŭ 50 jaroj. Post la 6-a leciono mi rezignis pri la lernado. Post kelkaj jaroj, kiel instruisto en vilaĝo Strelĉa — Plovdiv-distrikto, mi aĉetis 10 lernolibrojn kaj organizis kurson por vilaĝanoj. Mi lernis kaj samtempe instruis. Post la sepa leciono la vilaĝestro malpermesis la kurson.

Nur en 1972 mi serioze eklernis Esperanton, kaj en 1981 mi partoprenis en la Internacia Medicina E-Konferenco en Ruse.“

La parolon prenis ankaŭ **d-ro Stojan Moraresku**.

Li eklernis la Internacian Lingvon en 1924 kaj la saman jaron partoprenis la E-kongreson en Ruse. La sekvan jaron kun permeso de la direktoro de gimnazio en Orjaĥovo li estiĝis instruanto de Esperanto. En 1937 d-ro

Moraresku elmigras en Rumanion. Ĉi-tie, kiel studento en urbo Cluj, li gvidas E-kurson por rumanoj kaj hungaroj.

La 10-an de majo 1957 d-ro Moraresku kaj d-ro Todor Todorov fondas la Medicinistan Sekcion ĉe BEA. Depost tiam, jam 25 jarojn, Moraresku zorgas pri la aktivado de la sekcio, unuigas ĝiajn membrojn... Li estas la „vivanta historio“ de multaj E-kongresoj kaj forumoj, de la tuta ekzistperiodo de la Medicinista Sekcio. Lia vivo estas plene dediĉita al Esperanto.

... Rememoroj, rememoroj... Kaj ĉiu rememoro estis revelacio. Oni citis nomojn forgesitajn, nomojn de homoj, kiuj lernis kaj instruis Esperanton, estis punitaj kaj suferis pro ĝi, kiuj pereis en la batalo kontraŭ faŝismo kun Esperanto en la koro.

**Neli ABAĜIEVA**

## NOVA KONKURSO DE MONDA TURISMO

Internacia Asocio Monda Turismo ankaŭ ĉi-jare organizas sian tradician konkurson „Esperanto en turismon“.

Eble vi jam havis okazon partopreni en Esperanto-turismo aŭ en poresperantaj renkontiĝoj. Do, vi povus preni paperon kaj rakonti pri tio, donante utilajn informojn, prijuĝojn, seriozan kritikon. Rezulte vi povus gajni SENPAGAN PARTOPRENON en internaciaj Esperanto-aranĝoj en 1984. Kaj se vi emas plenumi aliajn punktojn de nia konkurso, vi grave kontribuos al la informado por ni tre bezonata. Bonvolu ne heziti kaj pri-labori almenaŭ unu el niaj temoj:

1. Sincera pritakso de Esperanto-aranĝo(j) minimume unupaĝe.

2. Priskribo de naturbelaĵoj, kaptintaj vian atenton, plaĉon dum ekskurso en la lasta jaro. Vi povas prezenti tion proze aŭ verse.

3. Sendu al ni eltranĉitajn artikolojn pri Esperanto-turismo el vialanda gazetaro kun traduko.

4. Pri la supraj temoj vi rajtas sendi fotojn, lumbildojn.

**Jen la premioj:**

— po unusemajna restado en Finnlando, Svedio, Turkio, Sofio, Benelukso, Pécs (dum SIA '84), Slovaka Paradizo dum TUSE, en Pollando (dum „Tagoj de Bydgoszcz — 84);

— en Zebegeny (Hungario) dum „Zamenhofa Internacia Pacmarŝo“, 1984;

— en Abaliget (Hungario), dum la 17-a Internacia Renkontiĝo Naturamika (IREN);

— en Budapeŝto (Hungario) dum la 13-a Vintra Esperantista Ferio (VEF);

— en Pisanica (Bulgario), dusemajna restado en Internacia Esperanto-Kursejo.

Vian konkursaĵon bonvolu sendi al la vic-prezidanto de MONDA TURISMO, s-ino Elizabeta Pallos (Pécs, Ybl Miklòs u. 9.I.2, H-7633, Hungario) ĝis la 30-a de septembro 1983.

## GORKIJ KAJ ESPERANTO

(1868—1936)



La 28-an de marto 1983 finiĝis 115 jaroj depost la naskiĝo de la rusa soveta verkisto Maksim Gorkij — fondinto de la soveta literaturo kaj de l'socialisma realismo en la literaturo.

Estas konata fakto, ke Gorkij estis amiko de Esperanto. Lige kun lia datreveno ĉi-sube ni donas lokon al fragmentoj el la libro „Rememoroj pri mia laboro kun A. M. Gorkij“ de I. S. Škapa, membro de la Unio de Sovetaj Verkistoj, kiu en la periodo 1928—1935 estis redakciano de revuo „Niaj atingoj“, redaktata de Gorkij.

\* \* \*

Motivo por interparolo pri la lingvo Esperanto estis la „Rusa-Esperanta Vortaro“, kompilita de grupo da aŭtoroj ĉekape kun N. Koralinskij. La ampleksa, 730-paĝa volumo estis eldonita en Moskvo, en 1910.

— Mi jam delonge havis la deziron vidi tiun ĉi vortaron! — diris Gorki. Ŝajnas al mi, ke ĝi estas inter la unuaj, eldonitaj en Rusio. Ho, ĝin foliumis mem la kreinto de Esperanto d-ro Zamenhof! Inter alie, li estis rimarkinda homo!

Mi kaj Bobriŝev sciis pri Esperanto preskaŭ nenion. Ni ekinteresiĝis pri ĝi nur konekse kun nia laboro super iu vortaro de sinonimoj, kaj nome tio igis nin aĉeti tiun ĉi libron, tiel forte altirintan la atenton de Gorkij.

Ni sincere konfesis nian plenan malscion rilate al Esperanto kaj petis lin doni sian pritakson pri tiu ĉi lingvo.

— Preskaŭ en ĉiuj landoj de la mondo — diris Gorkij, — jam delonge ekzistas esperantistaj organizaĵoj, oni organizas kursojn, eldonas lernolibrojn, milojn da libroj, centojn da revuoj, kunvokas internaciajn kongresojn kaj konsiliĝojn. Ĉio ĉi proksimigas la homojn el la kvin kontinentoj, servas al granda kultura afero. Kaj mi asertas: tiu ĉi arta lingvo estas farita tre lerte, pripensite, sagace. Kiel ĉio granda, ĝi estas simpla kaj klara. Estas facile ellerni kaj apliki ĝin. Tial ĝi estas necesa al la homaro! Krome, ĝi ne pretendas forigi la naciajn lingvojn. Ĝia tasko estas pli modesta kaj pli nobla: ĝi celas faciligi la aferecajn kaj kulturajn kontaktojn de la popoloj. Sed ĉu tio estas malmulta?

Li ekparolis pri la personeco de l'kreinto de Esperanto.

— Zamenhof donis al la homaro bonegan armilon en la batalo por interproksimiĝo de la homoj, por ilia transformo en grandan konkordan familion.

Post ioma silento, Gorkij denove ekparolis kun ĉiam pli kreskanta konvinkiteco:

— Eĉ, se vi volas scii, Zamenhof estas senpera posteulo de la mita Prometeo, kiu donacis al la homoj la fajron, ŝtelinte ĝin de la dioj. Zamenhof, siaflanke, donacis al la homoj rimedon por flamiĝo de spirita fajro, kapabla varmigi la korojn de milionoj da homoj sur la Tero. Ĉu ne estas tiel?

Nian silenton Gorkij pritaksis kiel konsenton. Kaj vere ĉu oni povis kontraŭdiri al lia varma apologio por Esperanto, pri kiu ni havis nur malklaran imagon?

Gorkij daŭrigis:

— Por mi Esperanto estas la plej perfekta kaj perspektiva internacia lingvo. Kreante ĝin, Zamenhof faris al si eternan monumenton!

Li rakontis pri la strukturo de la lingvo, pri la fundamento de ĝia gramatiko, pritaksante ĝin simpla kaj celkonforma.

— Esperanto, — klarigis Gorkij, — aperis en 1887. — Kaj depost tiam, sendepende de ĉiuj malhelpoj, ĝi evoluas kaj kreskas! Mi opinias, ke Esperanto estas kreita de genia homo kaj ĝi mem surhavas la stampon de geniece. . . Kaj mi estas certa: la titana laboro de Zamenhof ne estas vana! Esperanto estas lingvo de la estonteco — kaj de estonteco ne tiom malproksima! Esperanto estas universala lingvo! Ĝi povas transdoni ĉiujn nuancojn de la penso. Ĝi vivos, perfektigos kaj, mi ripetas, ĝi venkos ĉiujn siajn malamikojn.

Gorkij denove prenis la esperantan vortaron kaj subite demandis:

— Interalie, ĉu vi scias, kion signifas de la vorto „Esperanto“? Vi ne scias? „Homo, kiu esperas“ — tio estas ĝia signifo. Ankaŭ mi estas „esperanto“, kvankam pro manko de tempo mi ne estigis esperantisto. Kaj mi bedaŭras pri tio.

Foliumante la paĝojn, li prononcis: „Burĝo... laboristo... heroo...“, samtempe tradukante la vortojn en rusan lingvon. Evidente, iam li lernis la lingvon.

Redonante al mi la vortaron, Gorkij demandis:

— Ĉu vi okupigis pri Esperanto? Provu: Lev Tolstoj alte taksis kaj lernis ĝin. Kaj ne nur Tolstoj — multaj seriozaj kaj estimataj homoj ne konsideris ĝin vana afero.

Gorkij disiĝis kun ni kiel kun novaj esperantistoj. Manpremanante nin, li amike ridetis kaj iom solene diris per sia baso:

— Ĝis revido! La estonto apartenas al Esperanto!

Vidinte, ke ni ne komprenas, li tradukis ruse siajn vortojn kaj konsilis al ni: „Okupigu ankaŭ pri Esperanto! Vi nenion perdos, sed certe multon gajnos!“

Tiu ĉi interparolo kun Gorkij okazis en 1933. Nur post multaj jaroj mi rememoris pri Zamenhof kaj pri lia kreaĵo. Kaj tiam mi nevole pensis: „Kion skribis — ne kion parolis, sed nome kion skribis Gorkij pri Esperanto? Ne estas eble, ke li preterpasis en silento la „titanan laboron“ de Zamenhof, kiun li tiel alte taksis en sia konversacio kun ni.

Finfine mia persista serĉado donis fruktojn. En ĵurnalo „Rabis“, n-ro 7—10 de 1921 mi trovis leteron de Gorkij, plene dediĉitan al Esperanto. Defendante la lingvon kontraŭ atakoj kaj pruvante ĝian rajton de ekzistado, Gorkij skribis:

„La konservativa penso obstine asertas, ke Esperanto estas utopio. La viva, leĝkonforme evoluanta realaĵo ĉiam pli kategorie refutas la opinion de la konservativuloj“.

Aliloke en la letero li deklaras:

„La argumento kontraŭ Esperanto estas, ke ĝi estas artefarita lingvo, kaj ke oni ne povas krei lingvojn alie ol laŭ la natura vojo de evoluo. Mi ne scias kiamaniere estis kreataj la lingvoj tiam, kiam la homo unuafoje eksentis la bezonon paroli. Mi opinias, ke la teorioj pri origino de la homa parolo nekontentige klarigas tiun ĉi proceson. Al mi ŝajnas, ke ni homoj rajtas diri: ĉio, kion ni nomas „kulturo“, estas kreita de niaj scienco, tekniko, arto, parolo. Do, ĝuste tio, kio apartigas nin de la bestoj — ĉio ĉi estas artefarita . . .“

„Oni diras, ke artefarita lingvo ne povas evolui.

Mi ne estas esperantisto, sed mi scias, ke tiu ĉi artefarita lingvo evoluas sufiĉe rapide kaj transformiĝas en naturan fenomenon, ĉar ĝi respondas al la bezono de la nuntempaj homoj pri komuna, por ĉiuj komprenebla lingvo.“

La letero de Gorkij finiĝas jene:

„Ĉu oni povas nei, ke komuna por ĉiuj lingvo donos potencon antaŭenpuŝon al la proceso de kultura evoluo?

Ne, oni ne povas nei tion. Do, oni devas rekoni la neceson pri kreo kaj evoluo de simila lingvo.“

Daŭrigante miajn esplorojn, mi trovis jar-kolekton de „Sciigoj de CK de la Unuiĝo de Esperantistoj en la Sovetaj Respublikoj“. En ĝia n-ro 3—4 de 1928 mi trovis presitaĵn fragmentojn el artikolo de Gorkij, titolita „Respondo al iu intelektulo“. Gorkij denove decide esprimas sian opinion por Esperanto kaj kontraŭ la „konservativuloj“:

„La strebado krei lingvon komunan por ĉiuj homoj estas unu el tiuj kuraĝegaj revoj, kiuj ĉiam servis, servas kaj servos al la afero por organizado de la mondo laŭ la homa volo kaj por senlima evoluigo de la homaj kapabloj.

Estas nekontestebla fakto, ke, parolante en komuna lingvo, la laborhomoj el la tuta mondo pli rapide komprenus la unuecon de siaj interesoj“.

La supre cititaj kaj ankaŭ aliaj fontoj, kiujn mi sukcesis trovi atestas, ke Maksim Gorkij estis konvinkita adepto de Esperanto, ĉar kiel konate, la vortoj de tiu ĉi granda homo neniam diferencis de liaj agoj.

# GOCE DELČEV

(1872—1903)



Goce Delčev estas ideologo kaj organizanto de la revolucia naci-liberiga movado en Makedonio. Filo de metiisto, li studas en la gimnazio en Saloniko kaj en la militista rernejo en Sofio. Pro ligoj kun la bulgaraj socialdemokratoj li estis forigita el la militista lernejo.

Poste, depost 1894 li estas instruisto — kaj tio ne estas hazardaĵo — la plimulto de l'agantoj de la Interna Makedona-Odrina Revolucia Organizaĵo (IMORO) estis instruistoj antaŭ ol estiĝi profesiaj revoluciuloj.

Li estas unu el la gvidantoj de la revolucia-demokratia alo de la Interna Makedona-Odrina Revolucia Organizaĵo (IMORO), membro de ĝia Centra Komitato kaj de ĝia eksterlanda reprezentantaro (1896—1902), kaj unu el la aŭtoroj de ĝia Statuto. Li aktive partoprenas la preparadon de la Ilinden-ribeło<sup>1</sup> en 1903. Pereas en kunpuŝiĝo kun turka milittrupo.

Instrui al siaj edukitoj legi kaj skribi bulgaringve, prezenti al ili per la belarta parolo la hajdutan romantikon, la sekretan kaj danĝeran agadon de Levski, la heroecon de la Aprila Ribelo 1876 — tio ĉi estis natura momento en

la revolucia vojo de la estontaj agantoj de la organizaĵo.

Inter ĉiuj gvidantoj de la nova revolucia movado por liberigo de la bulgaroj en Makedonio kaj en la regiono de Odrin, Goce Delčev plej konscie kaj konsekvence serĉis tiun ĉi efikon. Krome, li zorgis krei presorganon de la movado — tiel naskiĝis la revolucia gazeto „Faro“ kaj la hektografa folio „Libero aŭ morto“, eldonataj en la montoj de Makedonio. Kiel ilia redaktoro estis altirita unu el la plej grandaj bulgaraj poetoj — Pejo Javorov.

Rezulte de la amikeco kun Goce Delčev, Javorov verkis la poemojn „Hajdutaj kantoj“ kaj „Hajdutaj sopiroj“. En la popola memoro la versoj

Tagon mi pasigas en lokoj sekretaj,  
nokton mi pasigas sur voj' nekonata. . .

estas ligitaj kun la revolucia ĉiutageco de Goce Delčev. Kaj aperas centoj da imitaĵoj de la versoj de Javorov — esprimo de la deziro denove kaj denove glori Goce Delčev.

La temo pri Goce Delčev havas sian lokon ankaŭ en la bulgara poezio de la sekvaj jardekoj.

Al Goce Delčev dediĉis siajn studojn kaj verkis romanon pri li la anglino Mercia Macdermott.

Al li estas dediĉitaj ankaŭ multaj popolkantoj. Ĉi-sube ni donas lokon al popolkanto pri la pereco de Goce Delčev.

## POPOLKANTO PRI GOCE DELČEV

Malhela nubo aperis  
flanke de Makedonio,  
flanke de Serska Banica.  
Tricent pafiloj pafis,  
tricent bravuloj falis!  
Unua pafilo pafis —  
ĝi trafis Delčev en koron,  
kaj li, falante, eldiris:  
„Anaro brava, konkorda,  
taĉmento mia fidela,  
kiam vi morgaŭ pasos  
tra tiu ĉi urbo Kukuŝ,  
mia patrino vin vidos —  
ŝi vin pri mi demandas!  
Kaj vi al ŝi respondu:  
„Via filo edziĝis,  
al tiu ĉi Makedonio,  
al tiu ĉi Serska Banica.  
Nigra tero — lia edzino,  
maldika pafilo — lia fratino,  
paro pistoloj — bofratoj,  
nigraj korvoj — svatantoj!

Tradukis: Lidia RAEVA

<sup>1</sup> Ilinden — la 3-a de aŭgusto, Tago de Sankta Elija



## TRA LA FENESTRO

A. KARALIJCĤEV

La etaj grizaj vilaĝoj preter la fervojo. La bruneta haŭto de ilia loĝantaro, la brulanta rigardo de la nigraokulaj junulinoj, kiuj starigas kun refalditaj manikoj kaj observas. Serena vespera horo. La vagonaro zigzagas inter la tritikoj simile al flugrapida nigra serpento kun levita kapo, kaj ĝiaj fenestroj, lumigitaj de la subiranta suno, brilas kiel oraj skvamoj.

La dometoj — kvazaŭ blankaj pizaj grajnoj, disĵetitaj en la senlima ora kamparo. Kuras la pizgrajnoj-dometoj, svingas kamentubojn, rompadas pomarbajn branĉojn, falas, levigas, spiregante pro rido kaj timo. Sur ilin alflugas malbonaŭgura hunda bojado, tiras la ĉifonaĵojn, kroĉitajn sur la plektobariloj por sekigi. Per senbruaĵoj paŝoj sur la pajlaj tegmentoj sidigas korvaĉo, poste malfermas flugilojn kaj ekflugas ĉielen simile al vesperpreĝo.

— Kokeriko-o-o — ŝiriĝas en la milda bluo de la ĉielalto — blanka somera nubeto.

Ie kantas sonorilo. Forgesita sopiro. Peko aŭ ĝojo. Aŭ miraĝo sur la bruligita manplato de la malbenitaj grenkampoj. Aŭ krio de la tero, kiu volas eltiri el sia sukplena brusto la pezan frukton de l'bono kaj proponi ĝin al la homoj:

— Prenu kaj manĝu! Lavu per fajroakvo viajn manojn, el kiuj gutas sangaj gutoj!

Se ni povus esti nur fratoj! Bonaj kaj fidelaj fratoj de la malavara tero! Leviĝadi de la malmola lito frumatene, lavi la okulojn kontraŭ la aperanta suno kaj kiel infanoj ĝui la sunon leviĝantan super la grenkampoj por enverŝi sukon kaj sanon en ĝiajn vejnojn-sulkojn. Trinki varman lakton kaj streĉante muskolojn, eksenti kiel ili fortiĝas! Por premi la plugilon kaj por teni la rikoltilon en nia mano. Okuloj niaj estu akrevidaj, direktante sin malproksimen al la grizaj montetoj, kie ĝermas pano.

— A-a-a! A-a-a! A-a-a-a! — tondras la krio de la tero, baldaŭ kreviĝonta por engluti la malnovan mondon.

Kuru vi, blankaj pizgrajnoj, en la vasteco de la benitaj tritikoj, kiuj malfermas sian verdan sinon por brakumi kaj kisi vin per milda karesa kiso, ĝis kiam vi fandiĝos.

Vespero. Pomarboj. Gardenoj. Kamparo. Flavaj malaltaj stacidomoj, kaŝitaj en tilioj. Feraj sonoriletoj intermite sonoras. La telegrafaj fostoj — viroj kun blankaj oreloj — seninterrompe frapas la fenestrojn samkiel la eta horloĝa montrilo:

— Tik! Tik! Ti-tik!

Kaj el supre malsupren — iras la ĉielo — blua kaj saturita per klaraj pluvaj gutoj, kiel roskovrita kampo en printempa mateno eligas sunvapon. Malsupreniras, por aŭdi la obtuzan lamenton de la popolo — entombigita en nigrajn sulkojn.

La vagonaro haltas, etendas sin sur la reloj, premas frunton teren, iom ripozas kaj ree ekstreĉas fortojn.

Vidalvide prunarba ĝardeno. Branĉo rompita pendas senhelpe super la plektobarilo. Blanka vojo en la krepusko. Knabino kun blanka kaptuko levas surŝultren kaldronojn, apogante sin sur la ŝimiginta putro. Nigra ŝafido kuras preter la ĝardeno kaj malĝoje blekas. Malaperis ankaŭ ili. Ree telegrafaj fostoj kaj grenkampoj. La rememoro trafis min je la frunto.

... Trenas sin vilaĝaj veturiloj, ŝarĝitaj per garboj. Arĝenta polvo ŝvebas super la stratoj. La trankvila malfrua somero estas etendinta manon super la vilaĝo. Subite, nesciate de kie — ili venis. Kugloj ekfajfis. La tago senviviĝis. ... Vi estas metinta manon sur mian frunton. Mi rigardas vin kaj ne povas rekonsciiĝi. Kie ni estas? Via vizaĝo — bruligita de la vento, estas bruneta kaj flaviĝinta kiel la rikoltitaj grenkampoj. Ie tondras bruoj. Bojas hundoj. Incendio, ĉu ne? Sub mia kapo estas io malseka. Sango. Mi kuŝas preter la vojo kaj vi estas kliniĝinta super min. Viaj okuloj estas larmoplenaj. Mi rememoras — vi demetis la blankan kaptukon, kliniĝis milde, bandaĝis mian vundon kaj ekkaresis min. Fariĝis al mi malturmente, facile — mi aŭdis voĉojn de konataj homoj — kvazaŭ kanton.

Subite mi vekigis. Antaŭ mi tuj elkreskis la kruela realaĵo:

— Ĉu oni mortigis ilin?

Mi ekpenis leviĝi, etendis al vi manojn kun peto kaj soifa turmento.

Vi ĉirkaŭprenis min, falis sur mian bruston kaj timigite eklamentis. La rikoltitaj grenkampoj ekploris, la muŝetoj — nigra aro super ni, ekploris.

Mi fermis okulojn. La vagonaro kuras kiel persekutata sovaĝa besto preter la etaj vilaĝoj. Obtuze sin puŝas sur la fenestrojn nigrafruntaj arboj kiel vespertoj.

Tradukis: MIMOZA

## DEBRECEN BONVENIGAS VIN!



Debrecen — loko de la 39-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO inter la 23-a kaj 30-a de julio ĉi-jare — estas unu el la plej grandaj urboj de Hungario laŭ nombro de loĝantoj (ĉ. 210 000 loĝantoj). Ĝi estas la ĉefurbo de hungara stepo **Hortobágy**, kiu situas en la orienta parto de la lando, ĉe rivero Tibisko. Ĝi havis tute alian aspekton komence de la 19-a jarcento, kiam la mond-fama hungara poeto Sándor Petőfi amis ĝin pro la vasta stepo, kie la pensoj pri libereco flugas kiel birdo.

La urbo estas 620-jara, sed kiel loĝata loko ĝi ekzistas ekde 1211. Debrecen ricevis urban rangon en 1361 de Lajos la Unua. Poste ĝi kreskis, ekfloris kaj fariĝis unu el la plej kulturaj urboj de Hungario. La Reformacio (komenciĝinta en 1536) por multaj jarcentoj determinis tiun evoluon, ĉar la specialaj trajtoj de tiu spirito konvenis al la ĝenerala pensmaniero de la evoluanta komercuro.

Debrecen ludis gravan rolon en la liberecbatalo 1848/49: ĝi estis la ĉefurbo de la lando kaj la reĝimo mem sub gvido de Lajos Kossuth transloĝiĝis tien. Tiun saman rolon la urbo havis dum kelkaj monatoj en 1944 kaj 1945.

La centra parto de Debrecen formiĝis ĉirkaŭ la Granda Preĝejo, Konsilantara Domo kaj Kalvinana Kolegio. Unu el la sonorilegoj de la Granda Preĝejo muldigis mem Georgo Rakoczi la Unua (regnestro de Transilvanio)

el kanonoj de la malamiko. Tiun „sonorilegon de Rakoczi“ oni sonorigas nur en solenaj okazoj. Ĝi diferencas de la aliaj sonorilegoj per tio, ke por ĝia ekpuŝo necesas almenaŭ tri homoj.

Kelkajn paŝojn for de la preĝejo troviĝas la plurjarcenta konstruaĵo de la Debrecen Kolegio. Ĝi estas fondita el 16-a jarcento, sed ĝian sudan alon oni alkonstruis en la pasinta jarcento. En la muzeo oni povas konatiĝi kun la plej interesaj ĉapitroj el la urba historio, trarigardante la valorajn relikvojn.

Proksime al la Kolegio troviĝas Muzeo Deri, kiu donas lokon ankaŭ al la urba biblioteko. La muzeo disponas pri konvenaj salonoj, kie estas elmontritaj historiaĵoj kaj belartaj ekspozicioj.

La paŝtista muzeo fidele prezentas gravajn kontribuojn kaj fazojn de la paŝtista vivo. Tie estas ekspoziciitaj popolartaĵoj de paŝtistoj kabano, bivakejo, ĉaroj, diversaj paŝtistaj iloj ktp. La eksterlandaj turistoj eĉ povas rajdi aŭ partopreni la rajdistajn tagojn.

En la centro de Debrecen troviĝas Hotelo **Arany Bika** (Ora Virbovo) simbolo de la urbo. De tie belega, larĝa aleo kondukas al la Grandarbaro. Tie en ŝatata loko situas Universitato Lajos Kossuth, kie kunvenos fine de julio ĉi-somere gejunuloj el diversaj landoj por partopreni la Internacian Junularan Kongreson de TEJO.

La konstruaĵo de unu el la plej belaj kaj imponaj universitatoj en Eŭropo estas finkonstruita en 1933. La novbaroka konstrustilo, forte akcentita fasado, granda franca parko, belega fontanaro faras la konstruaĵon rimarkinda kaj neforgesebla.

En la norda parto de la ĉefkonstruaĵo estas la dua el la plej grandaj bibliotekoj en Hungario. Sur la muroj de grandega aŭlo estas surskriboj — nomoj de hungaraj eminentuloj, kiuj naskiĝis en Debrecen kaj bonfaris al ĝi. Indas trarigardi la botanikan ĝardenon kaj sunfizikan esplor-instituton.

Meze de la Grandarbaro atendas vin naĝbaseno kun refreŝiga akvo. Se vi vizitus tiun urbon, nepre vidu la zoologian ĝardenon, gajan anglan parkon kaj partoprenu interesajn aranĝojn.

Debrecen atendas vin! Venu al la 39-a IJK de TEJO!

Atila SALGA

## PRI LA LOGIKECO DE „SLAVISMOJ“

Laŭ I. Nagy („Budapeŝta Informilo“, n-ro 8/1982), la „slavismoj“ estas nelogikaj. La aŭtoro ilustras sian penson per kelkaj ekzemploj.

Unu el ili estas eltirita el „Bulgara Esperantisto“.

La ekzemplo estas jena:

„M'Bow tute trafe karakterizas la okazintan en Sofio de la 15-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1979 Internacian Infanasembleon. . .“

Tiu ĉi vortordo, laŭ I. Nagy, signifas, ke „M'Bow karakterizas la okazintan en Sofio“, dum la penso de la aŭtoro de la frazo estas tute alia, nome, ke M'Bow karakterizas la Infanasembleon. Do, la uzita en „Bulgara Esperantisto“ vortordo, „slavisma“ vortordo, estas, laŭ I. N., nelogika.

I. N. malpravas. Lia interpreto de la frazo estas nekorekta: „okazintan“ estas epiteto (determinanto) de „Infnasembleon“. „Infnasembleon“ estas la epiteto (la determinato). Neniam, ĉe interpreto, la determinanto povas esti deŝirita disde la determinato: „okazintan“ kaj „Infnasembleon“ formas blokon, malgraŭ ke ili ne troviĝas en senpera apudo. Do, la donita de I. N. interpreto, ĉe kiu la menciita bloko malblokiĝas, estas erara.

La vortordo de la citita frazo estas plene logika. Iom da analizo: „okazintan“, kiel menciite, estas epiteto (determinanto), „en Sofio de la 15-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1979“ estas suplemento de la epiteto, kaj „Infnasembleon“, kiel ankaŭ estas menciite, estas epiteto (determinato). Tiu ĉi epiteto havas krom la epiteto „okazintan“ ankoraŭ plian — „Internacian“. Dum „Internacian“ estas senpere

apuda, „okazintan“ estas malapuda, sed tio tute ne ŝanĝas ĝian karakteron.

La demando, kiun starigas I. N., fakte estas stila — temas pri tio, ĉu estas preferinde uzi la vortordon, uzitan de „B. E.“ aŭ tiun rekomenditan de I. N.: „M'Bow tute trafe karakterizas la Internacian Infanasembleon. . . okazintan en Sofio de la 15-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1979“. Ebla estas ne nur la rekomendita de I. N. varianto, sed ankaŭ jena: „M'Bow tute trafe karakterizas la Internacian Infanasembleon. . . , kiu okazis en Sofio de la 15-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1979“. La diferenco inter tiuj ĉi tri variantoj, se ni konsentos, ke ĉiuj estas ordinaraj pure komunikaj, sen aldonaj nuancoj, estas nur stila, ne logikeca.

Ne estas mallogikaj ankaŭ la aliaj, prezentitaj de I. N., „slavismoj“: „Kelkaj similaj al li fervoruloj“, „Al la libera jam patrolando“, „Li vizitis la similan al N klostron“, „de lia blanka kiel neĝo ĉemizo“, „... vidi la dum kvar jarcentoj kaŝitan desegnaĵon“. Ĉiuj estas plene logikaj.

Alia demando estas, ĉu ili estas rekomendindaj. Tiu ĉi demando, fakte, estas demando pri la rekomendinda stilo. La uzenda stilo dependas de multaj faktoroj. Tio, kio estas rekomendinda en iu situacio, povas esti malrekomendinda en alia situacio. Se, ekzemple, la sinteza esprimmaniero ĉe „slavismoj“ minacas dum rapida buŝa parolado la tujan komprenon de la esprimataj pensoj, la „slavismojn“ nature, oni devas eviti ne pro tio, ke ili estas nelogikaj, sed pro tio, ke ili malfaciligas la tujan digesteblecon.

Ljubomir MIHAJLOV

## LA ALIAJ PRI NI

Antaŭ kelkaj tagoj mi trastudis denove la numerojn 8, 9, 10/1982 de „Bulgara Esperantisto“. Mi havis eblecon konatigi profunde kun artikoloj, skribitaj pri la glora 75-jara jubileo de BEA.

En ĉiu vorto de paroloj kaj artikoloj oni povas senti kiel grandan, sukcesan kaj fruktodonan vojon faris via bulgara E-movado de sia komenco ĝis la nuna tempo. Sajnas al mi, ke oni ne povus trovi sur la mapo tian alian landon, kie la E-movado kaj la kontraŭfasisma batalo estis ligitaj tiel forte kaj konsekvence, kiel en Bulgario.

Estas ne hazarde, ke pere de viaj geesperantistoj respondis al la malmaltrata petskribo centmil bulgarioj. Tio estas granda sukceso! Mirinda estas via rezulto!

Mi legas la numerojn de „Bulgara Esperantisto“ ĉiam kun granda ĝojo kaj atento. Laŭ mia opinio — tiel opinias ankaŭ aliaj — ĝi estas riĉa, bone redaktita, interesa revuo.

En la nova 1983 jaro mi deziras al vi, karaj redaktantoj, novajn sukcesojn en via laboro, fortan sanon kaj entuziasmon.

d-ro Attila Salga,  
Debrecen, Hungario

Mi estas jam 20 jarojn abonanto de „BE“ kaj esperas, ke la revuo ankaŭ estonte estos tiel interesa kaj leginda. Eble eĉ pli bona ol nun.

Ankoraŭfoje mi deziras al vi plenan sukceson en via laboro!

Herbert Järvaslu, Estonio, Sovet-Unio

## NOVA ELDONO DE „LA VERDA KORO“

Julio Baghy, LA VERDA KORO, Budapeŝto, 1982, 104 paĝoj.

„La Verda Koro“ de la mondfama hungara esperanta poeto kaj verkisto Julio Baghy (1891—1967) jam havas novan, trian eldonon. Ĝin aperigis Hungara Esperanto-Asocio. La unua eldono aperis en Budapeŝto en 1937, dank' al la financa helpo de nederlandaj amikoj de la aŭtoro. Ĝi estis stereotipe reeldonita en 3 mil ekzempleroj de la Varsovia branĉo de Pola Esperantista Asocio en 1965.

Kion prezentas tiu ĉi 104-paĝa verko? Ĝia subtitolo tekstas: „Facila romaneto por komencantoj“ (en la unua kaj la dua eldonoj la subtitolo estas „Facila romaneto el la vivo de esperantistoj en Siberio, por komencantoj, por daŭrigaj kursoj“).

La libro estas efektive romaneto, en kiu la verkinto surpaperigas en tria persono, kun malmulte da verkista fantazio, siajn rememorojn el la tempo de sia estado en militkaptiteco en Siberio dum la Unua Mondmilito kaj la unuajn du jarojn post ĝi. Per kaptanta maniero li rakontas pri la vivo kaj agado de esperantistoj el diversaj landoj, apartenantaj al diversaj nacioj kaj rasoj: poloj, latvo, hungaro, judo, slovako, rumano, germano, ĉinoj kaj japanoj — ĉiuj kunligitaj de homamo, naskita de la fratiga povo de Esperanto.

Samtempe, kiel la aŭtoro klarigas en la postparolo al la unuaj du eldonoj (mi ne komprenas kial la postparolo mankas en la nuna eldono!), la libro estas legolibro, destinita por komencantoj, finintaj la elementan kurson, kiuj per la legado de romanforma rakonto povu ripeti la tutan kurson, ne renkontante multajn nekonatajn vortojn kaj tre malfacilajn sintaksajn formojn. Sian celon la verkinto atingis per konforma stilo, per utiligo de laŭeble minimuma vortara materialo (entute 940 radikvortoj), kio ne estas facila tasko, kaj per same trafa distribuo, en speciala ĉapitro, de la gramatika kaj vortara materialo aparte por ĉiu el la 11 ĉapitroj de la romaneto. Tiurilate helpas ankaŭ la romanforma rakonto de la libro, kiu pli forte altiras la intereson de komencanto ol mallongaj anekdotoj kaj noveletoj, ĉe kiuj vole-nevole la intereso ĉiam refoje devas esti vekata.

Tiaspeca legolibro evitas la seniluziigon, kiun ofte spertas la lernintoj de elementa kur-

so, kiam ili aĉetas kaj komencas legi libron, sur kies unua paĝo ili renkontas 40—50 nekonatajn vortojn kaj komplikajn sintaksajn formojn.

La libro entenas ankaŭ sintakson (resumo de la plej gravaj reguloj), verkita de d-ro Kolomano Kalocsay.

En la nova eldono la verko estas kompletigita per hungarlingva traduko de ĝia gramatika parto, kio faras ĝin pli oportuna por la hungara leganto. Estus tre utile, se la eldonisto, laŭ speciala mendo, eldonus la gramatikan parton de la libro en aliaj naciaj lingvoj.

La ilustraĵoj de P. kaj M. Ehrlich pli riĉigas la eldonon.

Oni devas menciigi ankaŭ, ke ĉiu paĝo de la verko havas larĝan marginon por eventualaj notoj de la leganto.

La eldono estas belaspekta, preseraroj preskaŭ mankas.

Jen libro, kiun ĉiu fininto de la elementa kurso de Esperanto nepre devas posedi. Kiel literatura verko ĝi estas agrabla legaĵo por ĉiu esperantisto.

Dimităr HĂGIEV

## LA ROZO DE L'SULTANO

Krùdi, Gyula: „La rozo de l'sultano“, fabela historio por infanoj. Desegnaĵoj de Láslo Kertész. Tradukis el la hungara lingvo d-ro István Nagy. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, 1982. Prezo: 40 ft.

La fabela historio revenigas nin al la tempo, kiam Hungario estis sub osmana jugo. En malgranda urbo Budaburgo vivis trankvile majstro-botisto Kerekeŝ kun siaj du infanoj — Elinjo kaj Johaĉjo.

Sed iun tagon li subite mortis kaj la orfoj estis kontraŭvole disigitaj. Turka paŝao Kara Mustafa sendis la knabon en la „rozĝardenon“ de l'sultano por estigi lin janiĉaro.

La fratineto, ne sciante kion fari, decidis sin turni al la „patro de rozoj“ Gjul Baba — fama saĝulo, kiu kulturis rozojn kaj el ili preparis bonodoran rozoleon. Tamen Gjul Baba ne povis helpi al la knabino. Li nur donis al ŝi kristalboteleton da rozoleo, kiun la turkaj regantoj ege ŝatis. Kaj Elinjo piede ekiris al Istanbulo.



Post multaj travivaĵoj, helpate de bonkoraj homoj, la infanino atingis sian celon. Jen, fine antaŭ ŝi aperis la granda kaj bela urbo

Istanbulo. Sed kiamaniere ŝi povus liberigisian karan fraton? Kiu helpus al ŝi? Neatendite Elinjo vidis riĉe vestitan turkon, marŝantan laŭ la strato. La knabineto tuj malŝtopis la boteleton, plenan de rozoleo. La delikata aromo ravis la turkan paŝaon. Li ricevis donace la kristalboteleton kaj liberigis Johaĉjon. Do, Elinjo kaj ŝia frato feliĉe revenis hejmen.

La libreton oni legas plezure. Atentokapte verkita, ĝi interesigos la plej junajn legantojn. La fabela elemento — la magia forto de rozoleo — nur emfazas la ĉefan ideon pri forto de la frata amo.

Ankaŭ malpli junaj legantoj trovos la libron leginda, ĉar ĝi revenigos ilin en la mirindan landon de ilia infanaĝo.

„La rozo de l'sultano“ estas plaĉe ilustrita. Legante ĝin, oni ĝuas agrablan stilon de la aŭtoro kaj bonegan tradukon.

Veneta BALEVA

## tra la E-gazetaro

### POLITIKA DEKLARO

La ĉeĥoslovaka gazetara servo „Orbis“ sendis al la redakcio de „BE“ anglalingvan libreton „Political Declaration of the Warsaw Treaty Member States“ (Politika deklaro de la ŝtatoj-membroj de Varsovia Kontrakto). Ĝi estas subskribita la 5-an de januaro 1983 de la landaj reprezentantoj.

La ŝtatoj reprezentitaj ĉe la kunsido de Politika Konsult-Komitato, zorgoplenaj pri la komplika tutmonda situacio kaj internacia streĉiĝo, pri la senĉesa minaco de nuklearmila mondmilito, apelaciis al internacia kompreniĝo en la nomo de la civilizacio kaj vivo sur la Tero. La ĉeestantoj esperas, ke post la unuflanka deklaro fare de Sovet-Unio ne uzi unua nukleajn armilojn, la aliaj nuklearmilaj ŝtatoj farus la samon.

Menciinde estas, ke oni proponis egaligon de la nombro de strategiaj nuklearmiloj de Usono kaj Sovet-Unio, estiĝo de zonoj sen nuklearmiloj en Norda Eŭropo kaj Balkanio.

V. B.

### OLIMPIKO POR ESPERANTISTOJ

La 25-jara faka organizo Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (ESLI) anoncas altnivelan ŝakturniron, la Olimpikon por esperantistaj ŝakistoj (t. n. Verda Olimpiko).

La Verda Olimpiko pri Sako okazos de la 20-a ĝis la 29-a de julio 1983. La gastiganta urbo estos KALOCSA (Kaloĉa), baroka urbeto en Hungario.

Oni povas aliĝi aŭ kiel ludanto, aŭ kiel vizitanto. La detalajn informojn enhavas la Olimpika Bulteno (aliĝkotizo, aliĝmaniero, loĝado, mangado, premioj ktp.). Turnu vin al la prezidanto de ESLI, d-ro Jozefo Nemeth, H-6300 Kalocsa, Szabo J. u. 3. I/I

### PRI LA BULGARA-SOVETAJ E-LIGOJ

En sia materialo „Ĉefa temo de l'jarcento“, publikita la 8-an de januaro 1983 en la organo de CK de KPSU J. „Pravda“, la bulgara ĵurnalistino Kalina Kaneva substrekas la bulgara-sovetajn E-ligojn en jena tekstopeco:

„Ĉiufoje, alvenante en Sovetion, mi rememoras la poŝtaĵojn de mia patro — leterojn kuŝantajn dum multaj jaroj en kaŝejo, flavigintajn kaj paligintajn pro tempo. Sur ties stampo staras: „USSR. Urbo Sevastopolj“, 1933“. Soifo je fidindaj kaj detalaj informoj pri la konstruado de socialismo en Sovet-Unio estis ĉe la bulgaroj tiel granda, ke ili utiligis ĉiuspacajn eblecojn, inkluzive kontaktojn per la tre populara tiutempe Internacia Lingvo Esperanto. Laboristoj el la norda doko de Sevastopola haveno detale respondis demandojn, rakontis pri la funkciigo de giganta maŝinkonstrua uzino, pri la malfacila venko de kolhoza sistemo, pri sia vivmaniero kaj faroj.“

E. G.

### UMEA-PREMIO

Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), fondita en 1908 kaj aliĝinta al UEA, ekde 1973 ĉiujare aljuĝas UMEA-premion por la plej elstara medicina esploralaboro, publikigita en Esperanto. En 1982 la premion gajnis d-ro Saburo Yamazoe, ĝenerala sekretario de UMEA.

La financa bazo de la premio nun konsistas el 10 milionoj da enoj laŭ la nuna kurzo ĉ. 100 000 guldenoj kaj ĝi sendube estas la plej granda premia kapitalo en la E-movado. Ties fondinto estas d-ro Hideo Shinoda, honora prezidanto de UMEA kaj honora membro de UEA.

## LA JARKUNVENOJ EN SOFIO

La jarkunvenoj de la sofiaj E-societoj montris, ke estas farita granda laboro por ĝustigo de la membrolistoj, estas kolektitaj la membrokotoj kaj relative bone estas okazigita abonkampanjo al la E-gazetaro. Oni klopodis por organizo de E-kursoj, kiuj jam ekzistas en la plimulto el sofiaj distriktoj. Estis difinitaj la antaŭstarantaj taskoj de la instruista E-societo „Diĉo Petrov“, kiuj helpe de Urba Estraro de BEA estos sukcese solvataj. La du fervojistaj societoj objektive pritaksis sian staton rilate al la venonta internacia fervojista E-kongreso en 1984, kiu okazos en Bulgario kaj akceptis koncernajn decidojn pri la preparlaboroj. Oni strebas digne prezenti sin ne nur en la organiza laboro, sed ankaŭ ritate la lingvon.

Grava momento en la jarkunvenoj estis la elekto de novaj estraroj, al kio oni alpaŝis konkrete kaj serioze. En la E-societoj „Ivan Krăstănov“ kaj „Nikola Botuŝev“ oni reelektis preskaŭ komplete la antaŭajn estrarojn.

La Urba Estraro kun kontenteco donas bonan pritakson pri la E-jarkunvenoj, esprimante laŭdon al E-societo „Prospero“ kun prezidanto Verka Stajner kaj al E-societo „D-ro Stojan Vasilev“ kun prezidantino Jordanka Keremidčieva pro bona organizo de iliaj jarkunvenoj.

La bone pripensitaj kaj akceptitaj decidoj estas garantio pri sukcesoj en la estonta laboro.

Zora OŜANSKA

## RIĈENHAVA E-AGADO

La jarkunveno de E-societo „Diĉo Petrov“ en Ĉepelare — Smoljan-distrikto estigis festo por la lokaj esperantistoj kaj gastoj el Asenovgrad kaj Smoljan. Ĝin partoprenis Veliĉka Pistolova, administranto de fako „Organiza“ ĉe Komunuma Komitato de BKP, Jordan Jordanov, prezidanto de Distrikta Estraro de BEA-Smoljan kaj veteranoj-esperantistoj.

Priagadan raporton faris la prezidanto Dimităr Marev. Estis analizitaj la specifaj E-problemoj kaj taskoj, starigitaj de la 40-a Kongreso de BEA.

Dum la pasinta jaro funkciis tri E-kursoj por civitanoj kaj instruistoj. La korespondado kun esperantistoj el la socialismaj landoj estis aktiva kaj utila. Per prelegoj kaj personaj interparoloj la membroj konatigis lokajn loĝantojn kun la signifo kaj celoj de la E-movado. Estis superplenumita la planita nombro da abonantoj al ĵurnaloj kaj revuoj en Esperanto kaj bulgara lingvo. La mandolina, kanta kaj recita E-grupoj de la societo sukcese sin prezentis en revuoj kaj konkursoj je distrikta kaj landa niveloj.

La esperantistoj el Ĉepelare disvastigis sian helpmastruman agadon. Per la aranĝitaj naŭ produktadhaloj por servoj kaj finfabrikaĵoj en 1982 estis realigita sumo de 279 089 lv. kompare kun 83 000 lv. en 1981.

Oni akceptis decidojn por la estonta laboro. Unu anime kiel prezidanto estis reelektita Dimităr Marev.

Maria DIČEVA

## LITERATURA E-VESPERO

„La verkado de Ivan Sivarov“ estis la temo de literatura E-vespero, kiu okazis la 4-an de februaro ĉi-jare en Plovdiv. Ĝin organizis E-societo „Kulturo“. La intereso inter la plovdiva esperantistaro estis granda, kaj la salono — plenplena.

Maria Dimitrova prezentis la aŭtoron. Li mem recitis siajn versaĵojn „La Balkano“ kaj „La Drjanova monaĥejo“. Ivan Sivarov tralegis siajn rakontojn „La roko derompita“, „Stonĉizistoj“ kaj „La homo en protezo“ en Esperanto kaj en bulgara lingvo.

La ĉeestantoj aplaudis la aŭtoron kaj donacis al li florojn.

Ing. M. IVANOV

## CELEBRO DE JUBILEULO

La 6-an de februaro 1983 en urbo Sipka la samnoma E-societo organizis solenan celebren de la esperantisto-veterano Hristo Kurumilev okaze de lia 75-jariĝo kaj multjara aktiva E-agado. Ĉeestis esperantistoj el Stara Zagora, Kazanlak, Măglij k. a.

Dimomira Grozeva, membro de la loka E-societo faris ampleksan raporton pri la vivo kaj agado de la jubileulo. Salutarolojn faris: Petko Bonev, prezidanto de E-societo „Septembra Ribelo“ — Măglij Dimitir Sikov, prezidanto de E-societo „Sipka“ k. a. Ili enmanigis donacojn al Hristo Kurumilev.

Profunde emociita, la jubileulo tutkore dankis al la parolintoj kaj al ĉiuj ĉeestantoj pro la esprimita al li estimo.

Estis plenumita enhavoriĉa literatura-muzika programo.

Georgi BOTEV

## VELINGRAD INVITAS VINI!

Pitoreska montara naturo (770 m super la marnivelo), freŝa kaj milda pinaero, 70 diversenhavaj kuracaj termofontoj. Ĉiutage varia programo el lingvaj okupoj, promenadoj, piedaj kaj aŭtobusaj ekskursoj, prelegoj, projekciado de diapozitivoj, amuzaj vesperarangoj, dancoj k. a.

Vizitu VELINGRAD por partopreni la **INTERNACIAJN ESPERANTISTAJN seminariojn-feriojn** (18—28 de majo kaj 19—29 de septembro 1983), por ĝui la naturbelaĵojn kaj la tradicie riĉan programon en neforgesebla amika E-medio!

Limdato por aliĝo: 30.04., resp. 30.08.1983.

Partoprenkoto: 150 lv. (por eksterlandanoj); 9 lv. potage (por bulgaroj);

Por pli detalaj informoj turnu vin al **Manol Ĉolev, „Br. Petriĉi“ 14, BG-4600 Velingrad, Bulgario.**

\* \* \*

En Germana Demokratia Respubliko oni faras preparojn por fondi esperantistan fakgrupon pri la mastrumado de arbaroj kaj forstscienco. La celo estas ekapliki la Internacian Lingvon sur tiu faka kampo kaj ellabori Esperantan fakterminaron. Pliaj informoj ĉe: d-ro Karl-Hermann Simon, C. v. Ossietzkystr. 21, DDR-1300 Eberswalde-Finow, GDR.

## INTERNACIA — RENKONTIGO EN GDR

La 5-a Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj apud Berlino (GDR) en la Interkampadejo Krossinsee (IREBIK) okazos inter la 2-a kaj 16-a de septembro 1983.

IREBIK celas doni al siaj partoprenantoj la eblecon — plialtigi sian lingvan nivelon — konatiĝi kun Berlino, la ĉefurbo de GDR kaj kun ties bela arbaroriĉa kaj multlaga ĉirkaŭaĵo — ferii kaj ripozi en internacia E-medio

Antaŭtagmeze okazos lingvaj lecionoj, posttagmeze kaj vespere estos kulturaj programoj, ekskursoj, seminarioj, prelegoj k. t. p.

La IREBIK-anoj loĝos en malgrandaj domoj en la Interkampadejo, ĉirkaŭitaj de arbaro, rekte ĉe la belegra Krossin-lago. En ĉiu dometo estas 4 ĉambroj kun po 3 litoj kaj kuirejo kun elektra akvoboligilo. En ĉiu ĉambro estas lavujo. Preni duŝon eblas en aparta ejo.

La partoprenantoj devas mem zorgi pri la matenaj vespermanĝoj dum la tuta restado, kaj ankaŭ pri la tagmanĝoj en la tagoj de alveno kaj forveturo.

Partoprenkotizo por eksterlandanoj: 300 markoj. Eblas pagi surloke tuj post la alveno.

La nombro de la disponeblaj litoj estas limigita. Limdato pri aliĝoj estas 31-a de junio 1983!

Aliĝu senprokraste al: Esperanto-Asocio de GDR,  
Distrikta Estraro Berlin,  
1020 BERLIN,  
Breite Str. 35—36, GDR

## TUSE '83 VOKAS VIN

La Turisma Semajno (TUSE) en Slovaka Paradizo de la 23-a ĝis la 29-a de julio 1983 okazos en kampadejo Cingov, proksime al Spišská Nová Ves (orienta parto de Ĉeĥoslovakio).

Loĝado en 2—4 litaj ĉambroj en turismaj domoj. Manĝado en la kampadejo. La programo konsistas el perpiedaj ekskursoj, du tuttagaj perbusaj ekskursoj al Levoča, Glacia Groto kaj Altaj Tatroj, vesperaj E-programoj, amizvesperoj, konkursoj.

Partoprenkotizo: 800—920 Kčs.

La 29-an de julio post la finiĝo de TUSE ekzistas oportuna veturebleco al Budapeŝto per rapidvagonaro el Spišská Nová Ves.

Pliajn informojn donas kaj aliĝilojn akceptas: Peter Pavúk, Jilemnického 17/9, CS-052 01 Spišská Nová Ves, Ĉeĥoslovakio.

## EKSKLUZIVE POR VIRINOJ!

Antaŭ pli ol unu jaro dum NOREK (Nord-Okcident-Regiona Esperantista Kunveno) de la usonaj ŝtatoj Washington, Oregon kaj kanada provinco British Columbia, naskiĝis ideo krei artaĵojn por la 69-a Universala Kongreso en 1984 en Vancouver (Kanado). La ideoon provokis aĵo, kiu pendis sur la muro de la kunvenejo. Gi estis albuma aŭ prezenta stebaĵo.

Stebaĵo estas maŝinkudrita kunmetaĵo el tri teksaĵoj, kiuj poste funkcias kiel unu. Supra tavolo povas esti diversmaniere ornamita per brodado, alflikado, kunflikado. Meza tavolo estas vato aŭ mola, malpeza, dika teksaĵo. Suba tavolo estas simpla, firma, laŭeble katuna teksaĵo.

La albuma stebaĵo distingiĝas de aliaj stebaĵoj en tio, ke la supra tavolo estas kunmetaĵo de ortanguloj. Ofte la ĉefa motivo estas antaŭdecidita, sed detaloj rilate al koloro, elekto de materialoj kaj laborspecoj tute dependas de la fantazio kaj kapabloj de la unuopaj virinoj. La ortanguloj estas poste kun-kudritaj, kaj la tuto (jam kiel stebaĵo) estas kutime prezentata kiel esprimo de estimo al iu respektata persono.

Kaj nun kion deziras NOREK-anoj de esperansistinoj en ĉiuj landoj:

Karaj samideaninoj, bonvolu krei por ni kvadratajn teksaĵ-bildojn de famaj pontoj en viaj landoj. Baza fadenmaterialo estu kotona aŭ poliestera. Ĉiuj uzotaj materialoj estu laveblaj, firmkoloraj. La grandeco de la kvadrato estu 305×305 mm. Ĉirkaŭ la randoj de la drato aldonu pliajn 15 mm de baza materialo por ebligi kunkudradon.

En la dekstran suban angulon metu per ĉenkudreroj vian nomon, nomon de la ponto kaj nomon de la loko (ĉiuj tri en via nacia lingvo), kaj nomon de la lando (esperantlingve).


La artaĵojn sendu per registrita poŝto al: Sara Ann Estling, 1351 Grant St., Walla Walla, Washington 99362, Usono. S-ino Estling respondecos pri kudrado kaj stebado. Ŝi bezonos kelkajn monatojn por la laboro.

Kial ni elektis pontojn? Car ili estas simboloj por Esperanto kiel pontolingvo inter homoj kaj nacioj.


Dum la Universala Kongreso en Vancouver viaj artaĵoj beligos la kongresejon. Post la kongreso la stebaĵo estos montrata dum popularaj lokaj foiroj en Usono kaj Kanado. Tiel ĝi fariĝos eksterordinara propagandilo por Esperanto.

Eventualajn demandojn pretas respondi:

Olga Du Temple  
(por LKK de la 69-a UK),  
765 Braemar Ave,  
SIDNEY, B. C., V8L 3S1,  
Kanado



Modelo de stebaĵo



La orumitaj kupoloj de la templo-monumento en urbo Ŝipka (Balkan-montaro) de malproksime altiras la rigardojn. Ĝi estas konstruita memore al rusaj soldatoj, pereintaj por la libero de Bulgario en la Liberiga Rusa-Turka Milito (1877—1878).

## ŜAKO

### EL LA ORA FONDUSO DE LA ŜAKARTO

Ed. LASKER — THOMAS  
Londono, 1911

1. Dh5:h7+!...

Oferante la Damon, Blanko ellogas la Nigran Reĝon el ĝia rifugejo.

1. ... Rg8 : h7

2. Ĉe4 : f6 Rh7 — h6

La Nigra Reĝo estas devigita entrepreni riskoplenan vojaĝon en la malamikan tendaron. Reveni sur la antaŭan pozicion 2. ... Rh8 jam ne estas eble — ĝin minacas eleganta, tre malofita en la praktiko mato per la du ĉevaloj — 3. Ĉg6x.

3. Ĉe5 — g4 + Rh6 — g5


4. h2 — h4 + Rg5 — f4

5. g2 — g3 + Rf4 — f3

6. Kd3 — e2 + Rf3 — g2

7. Th1—h2 + Rg — g1

8. Re1—d2x!



Estas malfacile kredi, ke nur antaŭ 7 movoj la Nigra Reĝo trankvile kaj senzorge observis la batal-kampon tra la fenestro de sia propra kastelo!



## DEZIRAS KORESPONDI

### BULGARIO

Gelernantoj el Sofio deziras korespondi tutmonde: Boris Pavlov (17-jara), ĵ. k. „Ljulin“, bul. „B“, bl. 630, vñ. B, BG-1336 Sofio.

Greta Asparuhova (16-jara), BG-2212 v. Kalotino, distr. de Sofio.

Dora Anĵlova (16-jara), ul. „Ilija Vlačkov“ 33, BG-2129 v. Ravno pole, distr. de Sofio.

Evdokija Manolova (16-jara), bul. „Slivnica 11, BG-1309 Sofio.

Emilija Klimentova (16-jara), ul. „Violeta“ 4, BG-1746 v. Volujak, distr. de Sofio.

Petja Videnova (16-jara), ĵ.k. „Vălčo Ivanov“, bl. 317, vñ. A, BG-1309 Sofio.

Regina Aleksieva (16-jara), kv. „Filipovci“, ul. „11“ 1, BG-1790 Sofio.

Juliana Svilenova, kv. „Filipovci“, ul. „3“ 55-A, BG-1790 Sofio.

Boris Ljudmilov (10-jara), „Sjarov“ 8, BG-5500 Loveč — kun ĉl, kolektas poŝmarkojn, kalendaretojn, glubildojn, aŭtomodelojn k. a.

Sofia Georgieva, kv. „Ĥr. Smirnenki“, bl. 22, vñ. V, BG-1574 Sofio — kun ĉl, precipe el FRG, Greklando, Francio pri modo, modrevuoj kaj popola medicino.

Zdravko Mateev (25-jara filma operatoro), ĵ. k. „Družba“ bl. 62, vñ. E, BG-1528 Sofio — kun ĉl pri ĉt.

### ĈEĤOSLOVAKIO

10 junpioniroj-komencantoj (10—12-jaraj) deziras ekligi kontaktojn kun junpioniraj lernejoj grupoj el aliaj landoj. Esperanto-rondeto ĉe Domo de Junpioniroj, str. „Marxa-Engelsa“ 28, CS-010 01 Zilina,

### FRANCIO

Marc Blondeel (pensiulo), 22, rue Claude Debussy, F-59130 Lambersart — deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝmarkojn.

### HUNGARIO

Elizabeto Sift (42-jara instruistino), pf. 85, H-9401 Sopron — kun mezaĝaj samideanoj (prefere instruistoj) pri popalaj kutimoj, konstruaĵoj, muziko, belaj pejzaĝoj ktp.

Medveczki Gabor (18-jara gimnaziano), Debrecen, Ibolya u. 9, H-4027 — kun bulgaraj ĝejnuloj Illes Andras (17-jara lernanto), Budapest IV, Madach 15, H-1046 — kun ĉl pri biologio kaj literaturo

### SOVET-UNIO

Anatolij Surnakín (42-jara ingeniero) — 109444 Moskvo, ul. Ferganskaja 11-1, kv. 150 — kun loĝantoj de grandaj urboj pri E-movado, interkluba laboro kaj aliaj temoj.

Gintaras Ziaunys (junulo), Zemaitijos 9—25, SU-235500 Mazeikiai — kun ĉl pri pop-muziko, filatelo, interŝanĝas poŝmarkojn, bildkartojn, sondiskojn. Marina Korotj (22-jara studentino en konservatorio), ab. jaŝ. 1697, SU-290035 Lvov-35 — kun ĉl pri muziko, folkloro, ĝazo, E-kantoj, E-instruado kaj pri muzika eduko de infanoj.

Ĉefredaktoro: Dončo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVANSKI prof. Vasil ĈOĈOV, Dimităr ĤAĜIEV, Krăstju KARUCIN

Administrantino — Kalinka VASILEVA

Jurij Viktoroviĉ Orlov, ŝf. „295 strelkovej diviziis“ 8—83, SU-325000 Ĥerson — kun bulgaraj inventistoj kaj raciigantoj.

Aleksandr Krisin kaj Jevgenij Neŝid, ul. „Sverdlova“ 171—12, Maksimovka, Vogoduĥovskij r., Ĥarkovskaja obl. — kun ĉl pri ĉt.

Andrius Jansonas (18-jara studento), poste restante, SU-232043 Vilnius 43 — kun ĉl, sed precipe kun Japanio kaj Francio pri moderna muziko.

E. J. Viburyte (24-jara instruistino), Utenos raj., SU-234911 Tauragnai, Litovio — kun ĉl pri ĉt.

J. D. Augulyte (26-jara instruistino), Utenos raj., SU-234911 Tauragnaj Litovio — kun ĉl pri ĉt, sed precipe pri libroj, literaturo.

## NI KONDOLENCAS

En junio 1982 en Smoljan forpasis la esperantisto-veterano

**Vasil Ivanov Ŝterkov**

Li eklaboris 14-jara en la tabakindustrio, aktivis en la laborista klasbatala movado, estis ofte arestata kaj turmentata.

Esperantisto ekde 1934, unu el la fondintoj de la E-societo en Rajkovo, li estis prezidanto de la sama societo kaj membro de DE de BEA—Smoljan.

\*\*\*

La 4-an de januaro 1983 en Smoljan forpasis la konata esperantisto-veterano, vojaĝanto, abstinenculo, vegetarano kaj elstara E-pedagogo

**Petăr Georgiev Pamporov**

Li estis esperantisto ekde 1910. Pamporov prelegis pri Bulgario kaj Esperanto en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj kaj en Japanio. La morto trafis lin honora prezidanto de la E-societo „Kulturo“ en Smoljan.

\*\*\*

La 5-an de januaro 1983 en Ŝumen forpasis la membro de DE de BEA — Ŝumen

**Dimităr Antonov Penĉev**

Li naskiĝis en v. Diĉin, distrikto de Veliko Tărnovo. Lia brila literatura talento manifestiĝis en la humura periodaĵo de BKP „Ĥorovod“. En 1942 Dimităr Penĉev finstudis la Pedagogian Instituton en Ŝumen. Depost 1947 li servis kiel oficiro en la Bulgara Popola Armeo.

Penĉev esperantistiĝis en la jaro 1940. Depost 1979 li estis unu el la aktivuloj de E-societo „Vekigo“ en Ŝumen. En 1980 Dimităr Penĉev estiĝis membro de DE de BEA — Ŝumen. Kiel respondeculo pri la instrulaboro li grave kontribuis por la fakultativa lernado de Esperanto en la lernejoj.

\*\*\*

En v. Borima antaŭ nelonge forpasis

**Petăr Vasilev Markov**

Li naskiĝis en 1911. Markov estis multjara prezidanto de la E-societo en v. Borima, vicprezidanto de DE de BEA — Loveĉ kaj kursgvidanto de Esperanto.

Niajn sincerajn kondolencojn al la familioj de la forpasisintoj!

Sur la unua kovrilpaĝo: „Printempo venis!...“

Foto: Emilia Kirilova

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodio“ — 1 grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,

1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

P. K. 66  
1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, Bul. Lenin 117

# distroj

## — LABIRINTO



Helpu la papagon trovi la ĝustan vojon al la kago!

## AFORISMOJ

*Ne perdu senton pri bonhumoro. Por homoj ĝi estas la samo, kio estas oromo por la rozo.*

D. Galsworthy

*Vane pasis la tago, en kiu oni almenaŭ foje ne ridetis.*

J. Guyau

*Oni ne ĉiam povas esti heroo, sed resti homo ĉiam estas eble.*

Goethe

*Tre malĝoje estas ĝoji en soleco.*

G. Lessing

*Sen la laborbalasto la ŝipo de la vivo cedas al ĉiuj ventoj kaj ŝtormoj.*

Stendhal

*Oni ne povus imagi ion pli malgajan ol juna pesimisto.*

M. Twain

*Sekvu la voĉon de via menso, sed ne de via kolero.*

Shakespeare

*Iuj kuraciloj estas pli dangeraj ol la malsanoj mem.*

Seneca

*La dankemo ne ĉiam estas elokventa.*

Voltaire

*Neniam atentu tiujn, kiuj parolas bone pri vi, kaj malbone — pri ĉiuj ceteraj homoj.*

L. N. Tolstoj

*La momenta plezuro ofte estiĝas kaŭzo por longaj suferoj.*

C. Wieland

*La mensogo estas la plej abomena malvirto.*

M. Montaigne

*Ne trankviligu, ne lasu endormigi vin! Dum vi estas junaj, fortaj, viglaj — ne laciĝu fari bonon.*

A. P. Ĉeĥov

*Estas nenio pli malĝoja ol la vivo de virinoj, kiuj scipovis esti nur belaj.*

B. Fontenelle

ĈU NORMALAJ GUSTOJ?!



— Vi volas du frankojn por aĉeti bombonojn? Vi ne plu estas bubo! Ekde nun estas la momento, por vi, ekpeni pri pli normalaj gustoj!

— Onjo, vi tute pravas! Donu al mi kvin frankojn por aĉeti cigaredojn!...

(El „Kulturaj Kaĝeroj“)